

SK de IPR Proponoj de la Estraro al la Komitato:

- La estraro rekomendas la la komitato akcepti la proponatan regularo-tekston.
- La komitato dankas al s-ino Aida Ĉizikaitè pro la proponita teksto, kiun ĝi transdonas al la Komisiono pri Universitata Agado, por uzo kiel bazo por la regularo aludita gvidilo, kies tekston la Komisiono proponu al la Komitato ene de kvar monatoj de la regulara akcepto.

## **Regularo de la Scienca Komitato de Internacia Pedagogia Revuo**

de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Tiu ĉi regularo difinas la agadon de la Scienca Komitato de Internacia Pedagogia Revuo (ĉi-sekve SK de IPR aŭ SK). La Scienca Komitato starigas la komitato de ILEI, al kiu SK respondecas kaj raportas ĉiujare. La regularo estas akceptita de la komitato de ILEI en ...*[kompletigota]*

### **1. Difino kaj celo**

SK ekzistas por prijuĝi kaj aprobi fakajn artikolojn proponitaj al la oficiala organo de ILEI, IPR kaj tiumaniere altigi ĝian scienca nivelon. Ĝia oficiala lingvo estas Esperanto. SK havas nek apartan juran ekziston, nek sidejon.

### **2. Taskoj por plenumi la celon**

Membroj de SK mem kontribuas artikolojn, kaj plie altiras atenton de ekstermovadaj fakuloj per prezentata materialo kaj klopodas akiri de ili artikolojn kiuj kongruas kun la profilo de la revuo. Ili komentas aŭ recenzas ricevitajn artikolojn laŭ kriterioj difinitaj en ligita gvidilo, rilatante kun la aŭtoro kaj la redaktoro por atingi aperigeblan rezulton.

### **3. Konsisto**

SK havas prezidanton, vic-prezidanton, sekretarion kaj nelimigitan nombron de pliaj membroj. Novajn membrojn rajtas proponi SK, la redaktoro de IPR aŭ la estraro de ILEI. Membrojn kaj la sekretarion akceptas la Komitato de ILEI; SK mem elektas sian prezidanton kaj vic-prezidanton. Membroj de SK devas esti aŭ fariĝi membroj de ILEI kaj resti tio tra la mandato.

### **4. Financado**

La sekretario de SK ĉiujare proponas ĝis oktobro buĝeton por la sekva jaro, kiu estas enkorpigita en la buĝeton de ILEI sub la rubriko IPR. Taskoj plenumataj de SKanoj ne aŭtomate altiras honorarion.

### **5. Funkciado**

La meĥanismoj por cirkuligi kaj trakti artikolojn estas detalitaj en gvidilo ligita al ĉi tiu regularo. Tio plie fiksas aliajn administrajn precizigojn kaj la interrilatadon kaj rajto-limojn inter SK kaj la redaktoro de IPR.

### **6. Deĵorperiodo**

La deĵorperiodo estas kvin jaroj, mezurata ekde unu monato post la akcepto de ĉi tiu regularo. Je tiu momento la nune anoncanta konsisto de SK ekvalidas. Fine de la kolektiva mandato membroj rajtas esprimi pretecon daŭre kunlabori aŭ retiriĝi. Fino de membreco dummandate okazas pro deziro aŭ forpaso de membro aŭ ĉesigo de ties mandato flanke de la komitato de ILEI. Forfalintaj membroj povas sed ne devas esti anstataŭataj.

Pri ĉio netuŝita en ĉi tiu regularo validas la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI, kaj la gvidilo ligita al ĉi tiu regularo.